

SASAKI Teruhiro (japano)

## Pri la pronomo “CI”, la orfo de Esperanto

Je la nomo de lingva egaleco eĉ Esperanto devas zorgi pri la specialeco de naciaj lingvoj. El tiu vidpunkto mi volas paroli pri la uzado de pronomo “ci” en la Esperanta literaturo.

Ekzistas, sed ne estas ofte uzata, tiu estas la pronomo “ci” en Esperanto. Mortenaskiĝinta? Preskaŭ ĉiuj lernolibroj rekomendas uzi pronomon “vi” anstataŭ “ci”, kiel la angla pronomo “you”. Tia adomono helpas al japanoj kaj koreoj, kiuj havas tro multe da pronomoj por esprimo de dua persono, ĉar per la uzado de nur “vi” oni ne necesas zorgi pri diversaj dua-personaj pronomoj, dependante de cirkonstancoj. Sed neceso de uzado nur “vi” estas ne konvena al tiu, kiu legas per Esperanta traduko la Eŭropan literaturon, kie la rilato inter homoj estas esprimata per diferencigo de “vi” kaj “ci”. Por ekzemple – en hispana „Usted kaj tu”, en franca „vous kaj tu”, en germana “Sie kaj Du”, en rusa “вы kaj ты”, k.t.p.

Rilate al la Esperanta traduko de rusa literaturo ni trafas grandan malfacilecon en la uzado de pronomo de dua persono. En la dramo de Anton Ĉeĥov, “Onklo Vanjo”, aperis la sceno, kie Elena kaj Sonjo proksimiĝis pli intime. En la rusa teksto ŝanĝiĝo de rialto estas esprimita per uzado de dua persona pronomo «ты».

Jelena Andrejevna. Ankaŭ vino estas... Ni trinku je “ci”.\*

Sonjo. Trinku ni.

Tradukisto devas uzi “ci” en tiu okazo, ĉar alia metodo ne troviĝas. Li esprimas tiun cirkonstancon per la speciala komento.

«\*Ruslingve la vorton “vi” oni uzas por alparolo, i.a. por demonstri tro oficialan kaj eĉ malamikan rilaton al alparolato en situacioj, kiam oni normale diras “ci”. Mi diferencigis la uzadon de tiuj pronomoj nur kiam vere gravis priskribi la interrilatojn: unue, inter Jelena Andrejevna kaj Sonjo; due, inter Vojnickij kaj Serebrjakov. (*Rim. de la trad.*)»

[Anton Pavloviĉ Ĉeĥov, Onklo Vanja. El la rusa tradukis Mikaelo Povorin. Moskvo, 2005, p.21]

En la fama noveleto de Ĉeĥov, “La damo kun hundeto”, grandan signifon havas la transiro de pronomo “вы kaj ты”. Tuj post la intima rilato la heroo ekuzas pronomon “ты”, sed tradukisto, s-ro Korĵenkov, daŭrigas uzi nur “vi”.

«Kial mi povus ĉesi **vin**\* estimi? demandis Gurov. – **Vi** mem ne scias, kion **vi** diras.»

[Anton Ĉeĥov, Ĉeriza ĝardeno, Rakontoj, noveloj kaj dramoj. Kaliningrado, Sezonoj,

2004, p.233. La Damo kun hundeto.]

La tradukisto tiuokaze aldonis sekvan specialan rimarkon.

**Ĉi tie Gurov komencis cidiri al Anna.** [l.c. p.349]

La transiro de dua persona pronomo estas tiel grava, ke nepre necesas la ekstra komento. En la angla traduko mankas tia rimarko, nur “you” estas uzata sen klarigo.

“Why should I stop respecting you” asked Gurov. “You don’t know what you’re saying.”  
[The Chekhov Omnibus: Selected Stories. Translated by Constance Garnet. London, 1995, p.520]

En la traduko de “Eŭgeno Onegin” ne estas solvita tiu problemo, kvankam estas tre grava la transiro de “вы” al “ты” en la amletero de Tat’jana, skribita france kaj traŭkita ruse de aŭtoro.

Alia!.. Sed sur tuta tero	Другой!.. Нет, никому на свете
neniu hom’ egalus vin!	Не отдала бы сердца я!
Decidis la Supera sfero:	То в вышнем суждено свете...
mi estos <b>via*</b> , laŭ destin’.	То воля неба: я <b>твоя</b> ;
Viv’ mia estis garantio	Вся жизнь моя была залогом
de nia nepra rendevu’;	Свиданья верного с <b>тобой</b> ;
al mi <b>vin*</b> certe sendis Dio,	Я знаю, <b>ты</b> мне послан богом,

[Puŝkin Eŭgeno Onegin, tradukita de Valentin Malnikov, Letero de Tatjana al Onegin, p. 68; ПСС. 5, с.71.]

En angla traduko de Nabokov estas uzita la arkaika pronomo “thy” anstataŭ “you”, sed tio okazas nur unufoje, kaj poste daŭras nur la pronomo “you”.

Another!... No, to nobody on earth  
would I have given my heart away!  
That has been destined in a higher council,  
that is the will of heaven: I am **thine**;  
my entire life has been the gage  
of a sure tryst with **you**;  
I know, **you**’re sent to me by God,

[Aleksandr Pushkin, Eugene Onegin. Translated by Vladimir Nabokov. vol.1, Princeton

Univ. Press, 1975,p.166]

En tiu ĉi sceno la transiro de pronomoj estas tre grava, ĉar tio signifas, kiel arde flamiĝis la sento de amo ĉe Tat'jana.

Ni povas vidi multe da ekzemploj por neceso de uzado "ci" en la Eŭropa literaturo. Sed nun al ni sufiĉas nur tiuj ekzemploj, traktataj supere. En la traduko de greka filozofio tre ofte ni vidas uzadon de "ci".

« - Platono eraras. Kiuj ajn estas la dioj, je kiuj **ci** kredas, **ci** kreas ilin laŭ ia modelo, kiun **ci** vidas aŭ kredas vidi en **ci**. Tiel ke **cia** konduto restas ido de **cia** kono pro **ci** mem aŭ **ciaj** eraroj pri **ci** mem.

- **Ci** konu **cin** mem, rediris Kritono ...»

[ Han Ryner, L veraj interparoladoj de Sokrato. SAT-Broŝurservo – Laŭte!, Beauville, 1999, p.155]

S-ro Wennergen en sia libro pri Esperanta gramatiko traktas pronomon "ci" tre malvarme, kvazaŭ mortenaskiĝinta.

« *Ci* estas unu-nombra alparola pronomo (kiu tute ne montras sekson). *Ci* kai *cia* ekzistas nur teorie, kaj estas preskaŭ neniam praktike uzataj. Eblus imagi *ci* kiel pure unu-nombran *vi*, aŭ kiel intiman familiaran (unu-nombran) *vi*, aŭ eĉ kiel insultan (ununombran) *vi*. Sed **estas fakte tute neeble diri, kian nuancon ĝi montras**, ĉar ĝi apenaŭ estas uzata:

- *Ci skribas (anstataŭ "ci" oni uzas ordinare "vi")*. Tio ĉi estas la sola frazo kun *ci* en la *Fundamenta Ekzercaro*. Krome *ci* kaj *cia* estas menciitaj en la *Universala Vortaro* de la *Fundamento*, sed en la *Fundamenta Gramatiko* ("la 16 reguloj") aperas nek *ci* nek *cia*. Ankaŭ en la *Unua Libro* ili ne troviĝas.

**Iuj imagas, ke oni antaŭe uzis *ci* en Esperanto, kaj ke tiu uzo poste malaperis, sed fakte *ci* neniam vere estis praktike uzata.** Ĝi nur aperis ifoje en eksperimenta lingvaĵo k. s. **En normala Esperanto oni ĉiam uzadis nur *vi*.**

**Kelkfoje oni trovas *ci* en tradukoj, kie la originalo havas *ci*-similan pronomon. Tio plej ofte estas netaŭga tradukomaniero, ĉar *ci* apenaŭ kapablas redoni la sencon de ofte uzata normala vorto, kiam ĝi mem estas maloftega preskaŭ sensenca vorto.** Por montri ekz. nuancon de familiareco aŭ insultan sencon, oni uzu je bezono aliajn lingvajn remedojn:

- *"Jes, jes!" diris la reĝo, "lunde **ci ricevos** nian filinon!" ĉar nun, kiel al estonta bofilo, li parolis al li "ci"*. En la originala teksto aperis *ci*-simila pronomo, kiu montris intiman, familiaran rilaton. Oni povus alternative traduki ekz. jene: *"Jes,*

*jes!” diris la reĝo, “lunde, kara filo, vi ricevos nian filinon!”*, ĉar nun, kiel estontan bofilon, li nomis lin “filo”.

Tre multaj Esperantistoj ne komprenas la pronomon *ci*. Tial tiuj, kiuj provas uzi *ci* en interparolado, renkontas multajn malfacilaĵojn. En normala Esperanto oni simple uzas ĉiam *vi*, ĉu oni parolas al unu persono, ĉu al pluraj, ĉu oni parolas al intime konata persono, ĉu al fremdulo, ĉu oni parolas al amiko, ĉu al malamiko. Tio funkcias tre bone. **Je bezono oni povas pliprecigi per *vi sinjoro, vi amiko, vi kara, vi ĉiuj, vi amikoj, vi karaj, vi ambaŭ k.t.p.***»

[Bertilo Wennergren, Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko. Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, El Cerrito, Kalifornio, 2005, pp.102-103]

Laŭ la opinio de s-ro Wennergren la pronomo “*ci*” devas esti forstrekota el vortoj de Esperanto. Argumentoj kontraŭ la uzado “*ci*” oni sufiĉe vidas ĉe s-ro Wennergren. Sed ĉu estus permesita uzado de “*vi kara*”, kiam en la klasika literaturo estas skribita per rusa “ты”, germana “Du”, franca “tu”? Ĉu tio ne estas iuspeca falsado kontraŭ la kultura heredaĵo? Kiu kutimas al angla lingvo, uzanta nur “you”, tiu povas aprobi opinion de s-ro Wennergren. Sed la klasika literaturo devas esti tradukata fidele per Esperanto. Se “*ci*” ne povas ludi rolon por la esprimo de intima dua persona pronomo, tiam oni devus krei anstataŭ “*ci*” ion konvenan pronomon.

Lernolibro, publikita en slava mondo, ankaŭ opinias la pronomon “*ci*” neuzebla hodiaŭ.

«La personalo *CI* neniam estis destinita por ĝenerala uzo, nur por literaturo (precipe por traduki verkojn, en kiuj la *ci*-dirado rolas specialan taskon). **En la komencaj jaroj de la movado oni provis ĝin en la ampozio aŭ en prozo por alparolado de infanoj kaj bestoj, sed montriĝis, ke la pronomo, ne uzata en la ĉiutaga vivo, malhavas emocian forton, kiun tiaj verkoj bezonas. Tial ankaŭ en la literaturo venkis *VI* inter geamantoj, ĉe infanoj kaj eĉ ĉe bestoj, same kiel en la komunuza lingvo:** necesas nur atenti la nombron: *vi estas prava* (al unu persono), *vi estas pravaj* (al pluraj personoj). En la literaturo kelkaj aŭtoroj ankoraŭ uzas *CI* de tempo al tempo, ekzemple por emfazi insulton (*ci kanajlo!*). Konsiderinde ofte estas uzataj la verboj *ĉii* (*ci*-diri) kaj *vii* (*vi*-diri).»

[Miroslav Malovec, Gramatiko de Esperanto. Kava-Pech, Prago, 2000, p.48]

La plena vortaro ankaŭ adomonas uzi nur “*vi*”.

**ci**. Pronomo uzebla por nomi la alparolanton. Rim. Laŭ la konsilo de Zamenhof (“diri al ĉiu, ĉiuj kaj ĉio nur “*vi*”), **ci** estas tre malofte uzata; ĝin kutime anstataŭas **vi**: *post*

*paso de monato ŝanĝiĝis “Vi” per “~”Fz: mi tra feliĉa ploro diradas al vi: (C)~!U*

[La nova plena ilustrita vortaro de Esperanto, SAT, Paris, 2002]

Zamenhof mem uzas nur “vi” anstataŭ “ci” je la traduko de Gogol, eĉ tiam, kiam estas skribita en la originalo per “ты”.

Ĥlestakov. – Jen, prenu ĝin. (Fordonas la ĉapon kaj kanon.) Ha, vi denove ruliĝadis sur la lito?

Osip. – Kial do mi ruliĝadus? Ĉu mi neniam vidis liton, efektive?

Ĥlestakov. – Vi mensogas, vi ruliĝadis; vi vidas, ĝi tuta estas malordigita!

[N. V. Gogol, La Revizoro. tradukis L. L. Zamenhof. p.23]

Ĉiokaze difektas pli malgrande, ĉar interparolo iras inter mastro kaj servisto, ne inter amantoj. Sed kiel oni povas traduki sekvantajn frazojn de germana lingvo en Esperanton?

A: ... Aber Sie haben vorhin „du“ zu mir gesagt.

B: Natürlich. Und du sollst auch „du“ zu mir sagen.

A: Ich zoll zu Ihnen...

B: Zu dir!

A: Zu dir?

B: Sag mal „du“ !

A : Du.

[Hermann Leitner, Ferien auf Immenhof. 1957, Berlin]

Tre malofte, sed troviĝas eĉ la lernolibro, en kiu la pronomo “ci” estas traktata afable por la esprimo de proksima rilato. Sube estas la kara escepto.

**«ci = alparolo al unu bona amiko, anstataŭ “vi”»**

[Vilho Setälä, Privilegia vojo al lingvoscio – Esperanto internacia lingvo. Fondumo Esperanto, Helsinki, 1981, p.57]

Se la pronomo “ci” estus aprobita kiel la “alparolo al unu bona amiko”, tiam traduko fariĝus pli facila ol nuntempe. Esperantistoj havas plej gravan rolon por traduki el naciaj literaturoj en Esperanton. Se Esperanto pli malvastigas la eblecon de vortuzado ol naciaj lingvoj, oni devas solvi tian obstaklon kiel eble plej rapide. Ĝis kiam oni daŭrigos aldoni rimarkon pri la transiro inter “бы” kaj “ты”, kiel ni vidas je la traduko de verkoj de Ĉeĥov? Ĉu estas pli bone permesi uzadon “ci”? Al ni estas tre grave konsideri karakteron de nacia kulturo, ĉar ĉi-jaro estas nomata kiel “Internacia jaro de

lingvoj”. Almenaŭ por la traduko de nacia klasika literaturo oni bezonas permesi uzadon de pronomo “ci” je ci-simila pronomo.